



226
1.5.1985



BELGA KATOLIKO

Oficiala bulteno de la
BELGA KATOLIKA LIGO ESPERANTISTA

(B. K. L. E.)

Nacia Sekcio de la **INTERNACIA KATOLIKA UNUIGO ESPERANTISTA**

(I. K. U. E.)

DECEMBRO 1912

ENHAVO:

Gravega Avizo. — Internacia Pilgrimo Katolika kaj kvara internacia Kongreso de la Katolikoj Esperantistaj en Romo (7-14 de Septembro 1913.) — La praktika servo de Esperanto ĉe la milito kontraŭ la «Blanka Sklaveco» el. Espero Katolika. — Mirinda Konfeso pri la neceso de la Religio. — La «Boy Scouts». — Opinio pri Esperanto. — Oficialaj Sciigoj. — Kroniko de I. K. U. E.

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

ĉe **LEO HEIDENDAL**

A R E N D O N K

La Centra katolika Esperanta Oficejo

« ZAMENHOF »

AREN DONK

Akceptas mendojn por ĉiuj

Esperantaj libroj.

Vendas Esperantajn verkojn,
Gramatikojn, lerno kaj legolibrojn
Esperantistajn insignojn
k. t. p.

Kelkaj verkoj el la « Librejo »

| | |
|------------------------------|----------|
| Spirita Juvelaro | fr. 2.20 |
| Katolika Preĝaro | fr. 2.60 |
| La Kvar Evangelioj | fr. 1.60 |
| Hebrea Kalendaro | fr. 0.50 |
| Fabiola | fr. 3.80 |

k. t. pl.

Adresu ĉiujn mendojn al :

La Centra Katolika Esperanta Oficejo « Zamenhof »
AREN DONK

BELGA KATOLIKO

ORGANO DE
LA
Belga Katolika Ligo Esperantista
(B. K. L. E.)



NACIA SEKCIO DE LA
Internacia
Katolika Unuiĝo Esperantista
(I. K. U. E.)

REDAKCIO : Por ĉio kio koncer-
nas la redakcion (artikoloj —
informoj — broŝuroj — libroj —
k.t.p.) oni sin turnu al :

Sro Leo Heidental, ARENDONK.

ADMINISTRACIO : Por ĉio kio
koncernas la administracion (re-
klamoj — mensejoj — anoncoj
— k.t.p.) oni sin turnu al :

Gravega Avizo.

Al la membroj de nia « Belga Katolika Ligo »

Karaj geamikoj en Jesu Kristo, kiel Prezidanto de la I. K. U. E. Kaj membro de via Ligo, la agema kaj tutsindona Redaktoro de la Bulteno, « Belga Katoliko », la oficiala organo de nia movado en Belgujo, petis min bone klarigi al vi la nunan staton de nia afero : kion *ni* deziras fari, kaj kion *vi* kiel Belgaj Katolikaj Kristanoj, devos fari.

1^e *Nia nuna stato.* Je la 1^a de Januaro ni komencos la trian jaron de la ekzistado de « Belga Katoliko ». Sufiĉas nur momento da penso por kompreni ke tia Bulteno, bone presita, sur bona papero, enhavanta 12 grandajn paĝojn da interesaj artikoloj, kostis al I. U. multan monon. La verkistoj ja oferas sian tempon, siajn talentojn tute senpage. Al vi la plezuro de la legado, al ili nur la peno de la laboro ; ni ne plendas ilin, ĉar ilia Dia Mastro kiu promesis rekompenci eĉ glason da akvo donata je Sia Nomo, larĝe rekompencos ilin kiuj laboras nur por Lia gloro kaj por la defendo de Lia S^{ma} Religio. Efektive, iu pagis la koston de la presado, bona, pia, malavara katoliko, kiu absolute malpermesas al ni lin nomi. La membroj de nia « Belga Katolika Ligo » devas nur pagi 1 fr. jare. Ili ricevas la Bultenon tute senpage. El tiu unu franko ni devas depreni 0,25 por sendi al la Centra Oficejo de I. K. U. E. — Facile niaj legantoj komprenos ke 0,75 centimoj po membro ne sufiĉas

por pagi la diversajn elspezojn de la administracio de la ĵurnalo, poŝtelspezojn k.t.p. Tamen, tiel longatempe kiel eble, ni konservos la nunan etan kotizaĵon je 1 franko jare.

Sed tiun etan sumon ni devas absolute kaj senescepte postuli de niaj karaj gemembroj de la « Belga Katolika Ligo. » Ni ne dubas ke multaj el niaj abonantoj kiuj tiel regule pagis sian kotizaĵon, kaj honoras la poŝtkvitancon je 1.10 kiun ni prezentigos ĉe ili, ekkrios : sed ĉu estas eble ke ĉiu membro ne faras same kiel ni ? Ho ve ! ni devas tamen konfesi ke *multaj*, ni preferas kaŝi la nombron, sed *multaj*, malgraŭ nia antaŭaverto, rifuzis honoro la poŝtkvitancon de la lasta jaro kaj eĉ ne donis motivon por sia rifuzo. Ni tiam decidis dum la ĵus pasita jaro daŭrigi sendi la Bultenon al ĉiu el niaj enskribitaj membroj tio estas al 175 membroj, escepte al tri aŭ kvar kiuj ne nur rifuzis la poŝtkvitancon, sed ankaŭ rifuzis, kaj resendis al ni la Bultenojn. Ĉar la aliaj akceptis kaj konservis ĉiun Bultenon, al ili senditaj dum la lasta jaro, ni havas la rajton supozi ke ili volas resti membroj de nia « Belga Katolika Ligo. » Ni, do, prezentos dum la monato de Januaro poŝtkvitancon je 1.10 al ĉiuj por la abono de la Jaro 1913. Ni konsentos perdi la nepagitajn abonojn de 1912, ni eĉ pri ili ne plu parolos, sed ni esperos ke **nun** kaj **estontece**, ĉiuj pagos regule la etan abonon, kaj plue, helpos nin akiri multajn novajn membrojn. La Katolika Belgujo devus havi almenaŭ tiom da Katolikaj Esperantistoj kiom Nederlando.

Do, karaj geamikoj en Kristo, helpu nin, honoru niajn poŝtkvitancojn, por ke antaŭ la fino de Januaro ni scii povu, certe scii la nomojn kaj adresojn de ĉiuj membroj de la « *Belga Katolika Ligo*. » Tiam ni promesas ke, en speciala Bulteno, aperonta antaŭ la Paskfestoj, ni donas plenan liston de niaj membroj, dokumenton kiu estos, sendube, bonega propagandilo por altiri novajn aliĝontojn. Ni ricevas de korespondantoj el multaj landoj gratulojn pri la interesa enhavo de nia « *Belga Katolika* », ni kore dankas niajn alilandajn amikojn, kaj ni esperas ke la belgaj ebligis nin meriti dum longatempo tiajn laŭdojn.

Kore via, karaj geamikoj,
en Jesu kaj Mario
AUSTIN RICHARDSON
Prezidanto de I. K. U. E.

Internacia Pilgrimo Katolika

kaj kvara internacia Kongreso de la
Katolikoj Esperantistaj en Romo
(7-14 de Septembro 1913.)

1^a Cirkulero de la Preparanta Komitato.

Al ĉiuj membroj de I. K. U. E., kaj al ĉiuj
katolikoj Saluton en Kristo!

Karaj gesamideanoj!

Vi ĉiuj scias ke la jaro 1913 estos *tre grava* por nia kara movado.

Ĝis nun, jam trifoje estis donitaj al ni okazoj por montri al la tuta katolikaro, ke Esperanto povas esti kaj jam estas por ĉiuj naciaj filoj de la Sankta Eklezio, efika, facila kaj oportuna fratigilo.

Jam en ĉiuj kongresoj niaj, en Parizo, en Hago, en Budapeŝto, nia Sankta kaj amata Patro Pio X^a donis pruvojn de sia amo al ni kaj estimo por niaj klopodoj, sendante sian Apostolan Benon. Tiun-ĉi jaron, ni mem vizitos Lin, kaj nia vice prezentos al la komuna Patro de ĉiuj fideluloj la esprimon de nia amo, kaj fila submetiĝo. Ni vizitos Lin, en la Eterna Urbo, en kie de du mil jaroj, la spiritaj heredantoj de Sankta Petro neniam ĉesis, malgraŭ ĉiuj persekutoj, malgraŭ ĉiuj malamikaj klopodoj, dissendi la lumon de la katolika Fido.

Ni iros, filoj de ĉiuj naciaj, kiuj ekzistas sub la suno, porti kune al la Papo la certigon de nia firma decido labori kune, intime ligitaj per la komuneco de *fido*, kaj *lingvo* por la plivastigado de la Dia regno.

Pripensu kiom grava estas nia klopodo!

De la tempo kiam en la tuta kristanaro la latina lingvo estis la dua lingvo de ĉiuj, neniam alvenis en Romon tia pilgrimo *konsistanta el personoj ĉiurangaj, ĉiurasaj, ĉiunaciaj, kapablaj interkomprenigi*.

Sed antaŭ ĉio, ni memoru, ke ni volas plenumi *pian agon*, ne brueman lingvan manifestadon.

Ni ne iru Romon kun ordinaraj sentoj de bonaj Esperantistoj irantaj al iu kongreso: ni iru tien, kun humila kaj interna ĝojo de bonaj katolikoj irantaj al sia spirita patro, kaj vizitontaj la sanktajn lokojn, kie mortis la grandaj Apostoloj de Kristo, kaj, post ili, miloj kaj miloj de sanktaj martiroj, kiuj nun kantadas por eterne, en la lingvo de l'senfina amo, la laŭdojn de Dio.

Ni preparu nin, ne nur materiale, sed, ĉefe *spirite* al tiu *pilgrimo*! Ni ne forgesu, ke per vere pia ago, kiu altiros sur nian movadon la benon de Dio, ni centfoje pli faros por nia afero, ol per simpla manifestado, kiu celus nur altiri al Esperanto la atenton de la katolikaro.

Gesamideanoj!

Tiu granda pilgrimo, kiun, je la lasta vespero de nia 1^a kongreso, ni konsideris kiel malproksiman kronon de niaj penadoj, estas nun decidita afero!

Al vi ĉiuj, riĉuloj kaj malriĉuloj, ni faras plej koran, plej *insistan* alvokon! *Vi, de nun, decidu veni al Romo!*

Vi faru propagandon ĉirkaŭ vi! Vi varbu amikojn, parencojn! Vi de nun ŝparu monon por tiu bela, senkompara vojaĝo.

La Preparanta Komitato jam faris *multajn klopodojn*, kaj akiris la *certecon*, ke nia Pilgrimo al Romo estos *belega kaj sukcesa plena*; el ĉiuj partoj de l'mondo, jam venas multaj entuziasmaj promesoj de partopreno. Baldaŭ ni liveros al vi plenajn sciigojn pri la organizado kaj elspezoj, la vojaĝo, k.t.p. Ĉiu helpu al ni per sia tuja aliĝo! Eĉ, se

kelkaj el vi tion povas, ili faru mondonacon, eĉ malgrandan, por la organiza kaso.

Venu ĉiuj al Romo!

La Preparanta Komitato.

Abato A. Richardson, Cl. Colas,
Prezidanto, Sekretario,
121, rue du Marais, 51, rue de Clichy,
Bruxelles, Belgique. Paris.

Fino M. Larroche,
Centra Kasistino,

55, rue de Vaugirard, Paris.

Praktikaj sciigoj.

Post la 5^a de Januaro, jam preta estos *membrokarto* kaj *propagandaj markoj*. Oni do povas sendi de nun la kotizon por aliĝo (2 sm.) ĉu al la Centra Kasistino (Fino Larroche, 55 rue de Vaugirard, Paris), ĉu al la naciaj kolektantoj, kiuj ilin sendos poste al la Centra Kaso. *Do, la plej simple estas sendi rekte al F^{ino} Larroche, 55 rue de Vaugirard, Paris.*

Belaj aliŝoj estas ankaŭ preparataj; unu ekzemplero estos senpage sendata al ĉiu aliĝinto. Pluaj ekzempleroj estos aĉeteblaj por propagando.

Ni de nun havas *preskaŭ certecon* ke gravaj rabatoj estos konsentataj por la vojaĝo. Aliparte ni jam scias, ke ni estos gastogataj en Romo po tre moderaj kondiĉoj.

Mi intencas viziti Romon baldaŭ kaj, se eble, prezenti al la Sankta Patro, la filajn sentojn de ĉiuj I. K. U. E. anoj.

Cl. C.

LA PRAKTIKA SERVO DE ESPERANTO ĈE LA MILITO KONTRAŬ LA « BLANKA SKLAVECO » EL « ESPERO KATOLIKA ».

La celo de tiu-ĉi artikolo estas almontri la mirindan helpon, kiun Esperanto povus doni al tiu sankta, nobla milito, kiu unuigas la honestulojn, la moralemulojn, la kompatemulojn de ĉiu civilizita lando kontraŭ tiu malinda komercaĉo, kiu celas per ĉiusepecoj da trompaĵoj kaj perfidaĵoj havigi virinojn, precipe junulinojn, kaj liveri ilin al sklaveco pli terura ol al morto mem.

Por la honoro de la homaro ni ĝoje kon-

fesas, ke tiu nobla milito havas anojn inter la rangoj de diversaj religianoj kaj eĉ de ne-kreduloj, sed estas evidente, ke ni, kristanoj, ni katolikoj, devas ĉiam esti ĉe la antaŭposteno de tiu nobla homema armeo.

Mi havas la honoron esti membro de la komitato de la Belga Ligo kontraŭ la Blanka Sklaveco (angle: « White Slavery »). Nia Ligo ŝuldas sian fondon al la iniciato de tiu bona agema propagandisto S-ro A. COOTE, la ĝenerala sekretario de la angla Ligo « against White Slavery », Kontraŭ Blankulina Sklaveco.

Tiu inda sinjoro alvenis Bruselon je 1907 kaj sukcesis kunvenigi 25 personojn influajn, katolikajn kaj ne-katolikajn, kiuj fondis nian Belgan Ligon, kiu sufiĉe bone progresas. La internacia « Konferenco » okazis tiun-ĉi jaron en Bruselo de la 21-a ĝis la 24-a de Oktobro ĉe S-ro VALENTIN BRIFAUT, la agema sekretario, viro tute sindona al multaj bonfaraj societoj. Unu celo de tiu prepara kunveno estis, proponi deziresprimojn prezentotajn al la Internacia Konferenco.

Antaŭ ol sciigi mian personan proponon, kelkaj klarigoj estas nepre necesaj.

En la laboro de nia movado ni konstatas, ke afere tre grava estas trovi la rimedon, por averti oportune kaj ĝustatempe la malfeliĉajn virinojn, kaj malhelpi, ke ili falu inter la manoj de la fi-komercistoj, kiuj altiras ilin al la morala ruiniĝo. Tion celante, oni ofte klopodas interrilati telegrame aŭ letere kun la diverslandaj policanoj. Por sukcesi estas necese, ne perdi eĉ unu momenton, sed la terura lingva malfacilaĵo ĉeestas ĉiam. Estas grava eraro pensi, ke telegramo aŭ letero, france verkita, estas komprenata ĉe la policanoj de ĉiu lando. De la « Préfecture de Police » de Parizo ni sciigis, ke ĉe multaj, multegaj policoficejoj eĉ en grandaj urboj, ne ekzistas eĉ unu policano, kiu povas paroli aŭ korespondi per alia lingvo krom per sia patralingvo. Plue, pro la manko de interrilatoj inter la diverslandaj policanoj oni ne scias ĉu ili komprenas unu aŭ alian fremdan lingvon, aŭ per kiu lingvo krom la nacia oni povas interrilati kun ili.

La rezulto de tiu bedaŭrinda fakto estas

terura perdo de tempo, kiam oni devas interriliti kun fremdaj landoj.

Sed, de post du jaroj en la « Préfecture de Police » de Parizo, la centro de tiom da progresemaĵoj, kie formiĝis viroj kiel S-ro LÉPINE. S-ro BERTILLON k. t. p., fondiĝis internacia asocio, kies celo estas precize venki la malfacilaĵojn, kiujn ni bedaŭris. La celo de tiu internacia klubo de la tutmonda Policianaro estas, starigi konstantajn, ĉiutagajn interrilitojn inter, la policianoj de ĉiu lando en la civilizita mondo. S-ro E. TISON, la prezidanto de tiu klubo, havas tiun ĉi admirindan koncepton pri la Policianaro: laŭ li « ĝi ne estas nur nacia instituto; ne, la tutmonda Policianaro estas antaŭ ĉio internacia Asocio starigita de la civilizacio, por protekti la homan Societon kontraŭ la malbonuloj ».

Sed ne nur por la protekto de la junulinoj, sed por la internacieco de ĉiu katolika societo, Esperanto estas utiliga kaj eĉ nepre necesa. Pli kaj pli la Katolikoj de la tuta mondo devus plimulti reciprokajn interrilitojn. Rajte kaj ideale la Katolikaro estas unu granda familio, sed, pro la lingva barilo, ĝi estas, je la vidpunkto de mond-familio, familio da mutuloj sen komuna familia lingvo. Je la momento, kiam la Katolikaro posedos unu komunan lingvon, kiam ĉiu katoliko povos per Esperanto interriliti buŝe, kaj skribe, kun ĉiu alia katoliko, ni estos nevenkeblaj, ni estos la plej granda potenco sur la tero. Niaj malamikoj, almenaŭ la plej lertaj, bone antaŭvidas tion kaj pro tio klopodas ĉiamaniere dividi niajn fortojn. Ĉiu malamiko de Esperanto estas, volonte aŭ nevolonte, la malamiko de la katolika triumfo. Penadu ni por komprenigi tion al ĉiuj katolikoj, al pastroj kaj al laikoj.

Mi nun aldonas la leteron de S-ro TISON, respondante al mia demandaro. Tiun leteron mi aldonis al la Raporto de la Belga Sekcio de la Internacia Ligo kontraŭ la Blanka Sklaveco kun miaj deziresprimoj.

Austin RICHARDSON.

Mirinda Konfeso pri la neceso de la Religio.

Paroloj de S-ro Lépine, prefekto de la

polico en Parizo, dum la internacia konferenco de la Ligo kontraŭ la Blanka Sklaveco:

« Sendube ni neniam plene elradikigos la malvirton, tamen ni devas almenaŭ labori por malhelpi, ke ĝi faru malkulpajn viktimojn. La Ŝtato devas ludi grandan rolon en tiu laboro kaj mi bedaŭras, ke, almenaŭ ĉe la plimulto da grandaj landoj, ĝi ne estas morala, kaj eĉ religia. Jes, gesinjoroj, mi aldonas: **kaj — eĉ — religia.** (Tie ĉi S-ro LÉPINE altigis la voĉon kaj diris malrapide *unu vorton post la alia.*) Sed la moderna ŝtato estas nemorala, nereligia; ĝi estas neŭtra. Almenaŭ havas ni la rajton postuli, ke ĝi ne malhelpu la moralon kaj la religion kaj ke ĝi ne permesu, ke oni dissemu en la junajn animojn, kiujn ĝi devas eduki, « des ferments lamentables ». (Plorindajn fermentojn).

Ne estos eble priskribi la aplaudon entuziasman de la tuta ĉeestantaro post tiuj ĉi rimarkindaj vortoj de S-ro Lépine.

Mi skribis Esperante al S-ro Lépine, petante lin, diri al mi sincere, ĉu mi *tute akurate* ripetis liajn vortojn. Mi ricevis jesan respondon; la sekretario de M. Lépine skribis: « M. Lépine me charge de vous faire connaître, que vous avez *exactement* noté les termes de son allocution ». S-ro LÉPINE komisias min por sciigi al vi, ke vi ekzakte notis la vortojn de lia alparolo).

A. R.

La « Boy Scouts »

(KNABOJ SKOLTOJ).

La elpensito de tiu movado estas la bonkonata kaj atestimata Generalo Angla Sir Baden Powell, viro kiu sin interesas multe pri la fizika kaj morala bonstato de la juneco konstatis la neceson starigi ĉe la angla juneco kaj precipe ĉe la knaboj inter la aĝo de la 12^a ĝis la 18^a jaro kamaradaron unuigatan per kelkaj reguloj fonditaj sur la sento de honoro kaj lojaleco kiu dank' al Dio, preskaŭ ĉiam ekzistas almenaŭ latente, ĉe la knaba animo, kondiĉe ke la malvirto kaj la malbona ekzemplo ne jam difektis tiujn noblajn ecojn ĉe la infanoj. Sir Baden Powell

allogis la knabojn per tiu amo por la sportoj, por la vivo en la plenaero, por la aventuroj, en la arbaroj en la montoj k. t. p. Kompreneble tiaj sportoj povus prezenti iom da danĝero se aro da knaboj havus la plenan liberecon nur sekvi sian bonvolon. Sed la « Boy Scouts » estas kamaradaro tre bone disciplinigitaj. Estas speco da armeo sed tute sen iu militista celo, La « Scouts » posedas neniun armilon, nek paŭilon, nek glavon. La uniformo, tre simpla estas tamen tre pentrinda kaj similas al la kostumo de la kuraĝaj skoltoj kiuj loĝas en la montoj kaj la urbaroj de Ameriko. La koloro de la tuniko, de la pantalonetoj kaj de la ŝtrumpoj kaj la malpeza felĉapelo estas helbruna. La regularo, al kiu la « Boy Scouts » devas promesi lojalan obeon, estas sufiĉe postulema. La Scout devas tutkore kaj ĝoje sin submeti al siaj estroj kaj agi ĉiam, kiel ĝentilhomino kaj kristano. Jes, Baden Powell kvankam ne katolika, estas tamen tre religiema. En Anglujo knaboj el diversaj kultoj, Protestantoj kaj Katolikoj partoprenas en la movado. Tamen ĉiu Scout devas promesi esti fidela al Dio, al la Reĝo kaj al la Patrujo. Neniu malpia vorto, neniu blasfemo estas permesita; la interparoladoj malpiaj aŭ malĉastaj kaŭzas la forigon deĝinitivan.

Jen la naturo, jen la spirito de la Anglaj « Boy Scouts. »

Kelkaj personoj kies pli multo tute ne estis katolikaj aŭ eĉ kredantaj en Dio, klopodis starigi imitaĵon de tiu societo en Belgujo. Sed se ili imitis la kostumon de la Anglaj « Boy Scouts » la tuta spirito de la movado iĝis alia. Por montri klare la ne religian senton de la fondintoj, oni komencis ŝanĝi la anglan regulon, oni forstrekis la vorton Dio kaj Reĝo for de la promeso farata de ĉiu membro. kaj baldaŭ oni konstatis ke efektive politike kaj religie la movado estis ne nur ne katolika sed ankau antikatolika.

Tamen dank' al Dio, la katolika juneco povas estontece partopreni en tiu bona, sana movado. Efektive ekzistas tre sukcesplena fako de tiu Societo sub la titolo de « Belgian Catholic Scouts ». La nomaro de la honora komitato montros sufiĉe ke la katolikaj gepatroj devus sentime permesi al siaj karaj

knaboj varbiĝi inter la vicoj de la B. C. S. jen tiu listo:

M^r le Colonel Brassine

M^r Carton de Wiart, Ministre de la Justice

Mgr Keesen, Senateur

Mgr Proost

Le Commandant Salkin

M^r le Conseiller Stinglhamber

M^r Van de Vijvere, Ministre des Travaux publics.

Tiu bela katolika kamaradaro tre interesas la Esperantistoj. Efektive, tial ke jam ekzistas « Boy Scouts » en 5 diversaj landoj la demando pri internacia lingvo iĝas tre oportuna kaj Sir Baden Powell kuraĝigas siajn junajn amikojn lerni Esperanton por ke kiam ili vojaĝos, ĉu are, ĉu persone, tra fremdaj landoj ili povus havi amikajn interrilitojn kun siaj kamaradoj.

Dum nia tria kongreso en Budapeŝt oni sufiĉe longe paroladis pri la « Belgian Catholic Scouts ». La kongreso esprimis la deziron la plej korajn por la plena sukceso en Belgujo de tiu movado tute kristana, homa, kaj patriota. Fine, la kongreso voĉdonis por la sekvanta deziresprimo.

Deziresprimo.

Aŭdinte la paroladojn de S^o Colas kaj de Abato Richardson pri la neceso de internaciaj interrilitoj inter la diversaj societoj de la Katolika junularo en ĉiu lando, kaj konsiderante ke nenia ekzistas pli efika interrilitilo ol Esperanto. Tiu ĉi Tria Katolika Kongreso esprimis la deziron ke la membroj de I. K. U. E. zorgu por enkonduki Esperanton ĉe la junularo katolika, kaj speciale ĉe la novnaskiĝinta societo nomata « Boy Scouts. »

La Kongreso komisias Abaton Richardson transdoni tiun deziresprimon al la fako de tiu societo kiu ekzistas en Belgujo sub la nomo de « Belgian Catholic Scouts. »

Por labori al la plenumo de tiu ĉi deziresprimo estus tre bone se almenaŭ kelkaj esperantistaj knaboj aliĝu al tiu interesa movado. Por tio kaj por havigi iujn ajn informojn pri la « Belgian Catholic Scouts » bonvolu, karaj *legantoj*, *vin turni al Abato J. Petit, Vicaire, 125, rue de Laeken.*

A. Ro. « Honora Membro ».

Opinio pri Esperanto.

Antaŭ dudek kvin jaroj mi restadis dum kelkaj tagoj en Romo, kaj trairante foje la urbon, mi aŭdis, flandre dirite: « bonan tagon » Mi ekmiregis, kaj jen, sinjoro konata, ja, sed kun kiu tamen mi ne havis specialan rilaton, premis mian manon. Li multe ĝojis vidante sampatrujanon, kaj sincere mi konfesas, ke mi ankaŭ estis kontentega. Tuj ni estis la plej bonaj amikoj. Ni parolis pri la patrujo, k.t.p.

Fine mia nova amiko diris: Estas domaĝo ke ĉiuj homoj ne parolas saman lingvon, tio estus multe pli facila, kiam ni estas en fremda lando. Certe, mi respondis, sed formeti la lingvojn patrinajn estas absolute neeble, nek dece, nek bone, ĉar la lingvo patrino estas tuta la nacia spirito. Sed se oni povus enkonduki lingvon helpan, ekzemple: la lingvon latinan! Tiu estas konata almenaŭ de ĉiuj kleruloj. Jes, respondis mia amiko, la lingvo latina teorie estas konata, sed praktike, mi kredas ke ĝi estas nekonata. Jen, li ridante aldonis, dum ses jaroj mi ellernis la lingvon latinan, kaj forlasante la kolezion, mi apenaŭ kuraĝis, aŭ povis elparoli frazon. Mi respondis ke tio elvenis precipe el la instrumetodo. Se la lernantoj ne parolas latine, sed nur ellernas gramatikon, kaj skribas, neniam ili povos ĝin paroli. Mi tamen devis konfesi ke la lingvo latina estas tro malfacila por ke ĝi povu fariĝi helpalingvo por popolo.

Ni disiris.

Poste mi parolis ankoraŭ ofte kun miaj kunfratoj pri la utileco por la interrilatoj, de ia lingvo ĝenerala. Ĉiu diris sian opinion. Oni parolis pri la lingvo franca, angla, k.t.p. Sed unue la ŝtatoj ne akceptus kiel lingvon helpan ĝeneralan, lingvon alilandan, kaj due, ĉiuj lingvoj vivantaj estas tro malfacilaj por ke ili povu enkondukiĝi kiel helpaj lingvoj de la popolo. Oni ne devas serĉi, ĉu oni povus enkonduki lingvon ĝeneralan inter kelke da kleruloj; tio certe estus ebla, sed ankoraŭ kiel ni praktike vidas, tre malfacila.

Sekve oni devus elpensi lingvon tre facilan pri la gramatiko, kaj pri la elparolado.

Ĝis nun la provaĵoj ne bone sukcesis, fine ni ne havis multe da espero. Sed antaŭ ne longe kunfrato remetis al mi libreton; jen, li diris, nova lingvo! Estis la lingvo Esperanta endek lecionoj flandre kunskribita de Sinjoro Witteryck. Mi tra legis ĝin. Mi ne tuj entuziasmiĝis, sed tamen mi vidis ke la gramatiko estas tre facila kaj logika. Mi aĉetis vortaron esperantan, kaj ĝoje mi konstatis ke, almenaŭ laŭ mia juĝo, la radikoj estas bone kaj bone elektitaj; kaj la formado de la vortoj tre sagaca kaj facila. Post serioza ekzameno, mi kredas ke la sukceso de tia lingvo estas certa, se la esperantistoj same kunlaboras, kaj ke la lingvo esperanta faros grandan servon al la homaro kaj ankaŭ al la religio. Sekve mi opinias ke tiuj, kiuj laboras al la disvatiĝo de tia lingvo, faras bonan kaj meritplenan agon. Jen mia humila konvinkigo.

D. BERNARDO CLONEN, O.S.B.
Prioro de la Benedikta
Abatejo de Termonde
BELGUJO.

Oficialaj Sciigoj.

Pri I. K. U. E.

Diverslandaj katolikaj samideanoj petas min, ke mi sciigu ilin, kiamaniere ili povas aliĝi al I. K. U. E.

Ĉar sufiĉe multaj forgesis aldoni respondukuponon, kaj despli, ĉar laŭ deziresprimo de « Nia Tria » en Budapeŝt nepre estas dezirinde, ke ĉiu, kiu deziras aliĝi al I. K. U. E. ankaŭ legu kaj abonu ĝian oficialan organon « Espero Katolika », mi en ĝi publikigas mian respondon.

Unualoke mi atentigas, ke anoj de I.K.U.E. ne estas personoj privataj, sed nur regionaj kluboj, landaj unuigoj, aŭ naciaj ligoj.

Kiam do iu privatulo deziras aliĝi al I. K. U. E., li komencu unuigi minimume 20 esperantistojn katolikajn, kiuj, tiel unuigitaj, povos aliĝi al I. K. U. E. — almenaŭ se en sia lando ne ekzistas katolika ligo esperantista, aliĝinta al I. K. U. E. — paginte po membran kotizon ĉiujaran da Sm. 0.10, do por 20 membroj Sm. 2. — poĵare, kaj send-

inte antaŭe ĝian klubregularon, por ke la Estraro de I. K. U. E. ekzamenu, ĉu ĝia enhavo ne kontraŭstaras la regularon de I. K. U. E. — Rekomendinde estas ankaŭ, ke la diocesa Episkopo aŭ landa Episkoparo antaŭe aprobu la regularon. — Okaze, ke en la lando, kiun loĝas la starigitaj aŭ starigotaj kluboj, kiuj deziras aliĝi al I. K. U. E., jam ekzistas unuigo aŭ ligo nacia, aliĝinta al I. K. U. E., tiuj kluboj plej regule povos aliĝi al I. K. U. E., pere de tiu landa aŭ nacia ligo.

**

Oni permesu al mi eldiri tie-ĉi, ke laŭ mia konvinko la maniero, je kiu niaj nederlandaj samreligiaj esperantistaj aranĝis sian organizon, estas *modela*.

Konforme al la *regulato de I. K. U. E.* verkita dum, kaj aprobita de « Nia Unua » en Parizo, kies *art. 3a* ordonas: **Starigi naciajn kaj regionajn katolikajn Esperantistajn Ligojn en diversaj landoj**, — la nederlandaj samcelanoj sub la nomo: « **Nederlanda Katolika** » starigis **Katolikan Ligon Esperantistan**, kies anoj estas katolikaj, Episkope aprobitaj, unuigoj Esperantistaj.

« Personoj, kiuj ne estas anoj de iu loka unuigo katolik-esperantista, sed apogas la Ligon per laŭstatuta kontribucio, estas favorantoj.

Ĉiujare la lokaj unuigoj elektas el siaj anoj po unu estrarmembron, kiuj kune konsistigas la Ligestraron.

« Tiu Ligestraro ĉiujare elektas ĉefan aŭ sagan Estraron, konsistantan el 7 personoj, nome: prezidanto, vicprezidanto, sekretario, helpsekretario, kasisisto kaj du membroj sen antaufiksita ofico.

Ĉiu ano aŭ favoranto de iu aliĝinta loka unuigo estas elektelebla kiel membro de la Saga Estraro ».

**

Ĉar rilate al I. K. U. E. « Nia Tria » en Budapeŝt, rememoriginte, ke estas nepre devo por ĉiu nacia sekcio de I. K. U. E. akurate pagi la fiksitajn kotizaĵojn, decidis:

1^e. Ke tiu pago devas komenci kun la jaro 1911 por la tiam ekzistintaj sekcioj.

2^e. Ke nur la unuigoj aŭ ligoj, kiuj ĝustatempe pagis la jaran kotizon, estos rigardataj kiel membroj de I. K. U. E.; pro tio mi afable sed insiste petas la estimatajn sekretariojn de niaj diverslandaj sekcioj, ke ili kiel eble plej baldaŭ **havigu al mi la nombrojn de siaj anoj dum la jaro 1911 kaj dum 1912 aldonante la ŝulditajn kotizojn**, kies saldo estos sendata al la ĉekbanko de nia samideano Ĉefeĉ en Londono.

Tuj kiam la konstanta kongres-sekretario, S-ro COLAS, estos pretiginta sian Oficialan Raporton, mi pli detale sciigos la gelegantaron de Espero Katolika pri la I. K. U. E.-diskutoj kaj decidoj dum « Nia Tria », jam nun alvokante la bonvolan kunhelpon de ĉiuj niaj samcelanoj por florigi nian Mondligon.

FRANS KNAAPEN,

Tilburg (Nederlandoj).

Sekr. ĝen. de I. K. U. E.

Kroniko de I. K. U. E.

Aŭstria Katolika Ligo Esperantista.

Merkredon, la 11. IX., je la oka vespere okazis prediko esperanta, la unua en Vieno. La predikanto estis lia moŝto D-ro Giesswein. Li pritraktis la plej sanktan Eŭkaristion, donantan al la mondo vivon kaj lumon, kvankam la mondo senpenseme ne ŝatas tiujn donacojn. La nordlandanoj ekzemple tre ĝoje salutas post multsemajna senlumo la alsopiritan sunon nur dum kelkaj minutoj aperantan. Tiamaniere certe ankaŭ la malvarmkoraj homoj, salutis la vivigantan kaj lumigantan eternan sunon, Jezuon Kriston en la plej sankta Eŭkaristio, se tiu grafonto dum kelka tempo tute fermiĝis. — La kriptoj, en kiu okazis la prediko, tute estis plena je aŭskultantoj.

Post la diservo oni iris en proksima gastejo por ĉeesti la starigon de nia A. K. L. E. Bedaŭrinde multaj homoj ne povis partopreni, ĉar mankas sufiĉa spaco. S-ro redaktoro

SCHRÖDER motivis la starigon de nia unuiĝo kaj lia moŝto D-ro GIESSWEIN entuziasmigis per mallonga parolado la ĉeestantojn. Post la antaŭlego de la regularo oni faris tiun-ĉi proponon por elekto de unuiĝestraro, kiu ankaŭ estis akceptata : prezidanto **Johano**

Schröder, redaktoro ; substituanto Bernhard ULM ; sekretario Jozefo HÖRL, instruisto ; substituanto J. MITTERHAUSER ; kasisto Karlo WESELY ; subst. Mav FÜHRING, instruisto ; konsilantoj : Johano AIGNER, sekretariisto ; Henriko KELLNER, instruisto.

Esperantistoj.

En ĉiuj lokoj de la tuta mondo, mi serĉas gerepresentantojn por disvastigadi. de mi, fabrikitajn Esperantajn Artikolojn, bezonataj al ĉiu persono ; ankaŭ por ne Esperantistoj.

La Artikoloj, samtempe, servas, ankaŭ kiel la plej grava propagandilo por la lingvo Esperanto.

Specimenojn kaj prezarojn en la lingvo Esperanto mi sendas senpage.

Leterojn en ne Esperanta lingvo mi ne akceptas.

A. MIROPOLEKIJ BUDAPEST
V. Vaczi-ut, 4, (Hungarujo).

Atentu Geesperantistoj.

La plej efika kuracilo por la tuso kaj ĉiaj malsanoj de la gorgo, brusto aŭ bronkoj, estas la mondkonataj pasteloj :

Spa Goudron

haveblaj ĉe multaj apotekistoj kaj *recte de la elpensinto*, S-ro. Desonay, Spa, Belgujo, en beleta skatoleteto je 60 spesdekoj = fr. 1.50.

Abato Richardson skribis al S-ro. Desonay de Bruselo : « Korajn dankojn pro viaj pasteloj « SPA GOUDRON ». Dank' al ili mia » bronkita tuso malaperis preskaŭ ensorĉe ».

Geesperantistoj,

Se vi deziras havigi la plej perfektan Gramofonon, mendu la lastan elpenson, t. e. la Gramofonon sen trumpeto kaj sen pikilo. La safiro de « Pathé » anstataŭas kaj multe superas la malnovan pikilon. Multaj Pastroj, Kolegioj k. t. p. sendas laŭdemajn leterojn al la Fabrikistoj. Petu cirkulerojn de la Société Française des Machines Parlantes, 89, Boulevard Brune, Paris.

INTERNATIONAL CORRESPONDENCE EXCHANGE.

(I. C. E.)

Monata ĵurnalo enhavanta artikolojn en Esperanto kaj en diversaj lingvoj. Organo por la interŝanĝo de poŝtmarkoj, kaj korespondado per ĉiuj lingvoj, la Abono = frkj. 2,50 jare. (1 Sm.) Oni sin turnu al la Redakcio : Avenue du Moulin 16, Forest-Bruxelles.

PROPONOJ POR INTERKORESPONDADO.

Oni petas la korespondantojn jam cititajn, kiuj ne plu deziras korespondi, tion sciigi al la Redakcio kiel eble plej baldaŭ. Ni nepre altiras la atenton al ĉi tiu avizo.

N. B. Estas devo je honoro respondi al ĉiu korespondanto almenaŭ unufoje.

S^{ro} J. Merino, Berabeŭ, Argentina Respubliko.

La membroj de la Grupo « Zamenhof », sin turni al S^{ro} Richardson 121, Rue du Marais, Bruselo.

La membroj de la Grupo « Antaŭen », sin turni al la Prezidanto S^{ro} E. Baez, Montenegro Strato, 13, Bruselo.

Pastro Decoene, Roman Catholic Church, Brandon (Man.) Canada. Povas nur doni adresojn, ne persone korespondi.

S^{ino} Doktorino Biske, por la Grupo de Spa, Hôtel de la chaîne d'or. Povas doni multajn adresojn.

La grupo de Basel, Svisujo. Adreso : Sro Rusterholz, Prezidanto 22, Marschalkenstrasse.

La membroj de la « **Novkastela Societo de Katolikaj Esperantistoj** », sin turnu al la Sekretario, S^{ro} Wallace-Mackay, 10, Roxburgh Place, Newcastle-Upon-Tyne, Anglujo.

S^{ro} W. E. Damon, M. D. 813 John St. Portsmouth Ohio. V. S. A.

LIBREJOJ Esperantistaj

A. J. Witteryck, Presisto-Eldonisto, Brugge.
Spineux & C^o Rue du Bois Sauvage, Bruxelles.
Belga Esperanta Oficejo, Vondelstraat, 20, Antwerpen.
Franca Esperanta Oficejo, Rue d'Angoulême, 20. Paris.
A. N. Govers, Westeinde, 6, Den Haag.

HOTELOJ

COURTRAI : « Hôtel du Nord » Je la stacidomo, Kunvenejo por Esperantistoj.

Au Moulin d'or, Rue d'Assaut, Bruxelles. Esperanta Kunvenejo.
Hôtel Louis Le Grand 2, Rue Louis le Grand, Paris. En belega loko,
apud avenue de l'opéra.

Hôtel Métropole, Brussel.

La plejgranda hotelo en Belgujo, 500 ĉambroj kaj 150 ĉambraroj kun banejoj.

Oni parolas Esperante.

LONDONO : Tre rekomendinda kaj komforta, vere « ESPERANTA-HEJMO ».
Sinjorino O' Connor « Esperante House », 17, St. Stephens Square. Bayswater,
London, W. Tre moderaj prezoj.

Rekomendindaj Firmoj

Sinjoro Leo DE COENE-HAUTEKEETE, Rue Savary, Courtrai.
Fadenoj — Stupoj — Kotonoj spinataj k. t. pl. — Oni parolas Esperanton.

Notariejo de Sinjoro BOSSAERT, Courtrai.

Pension-Lernejo por Fraŭlinoj. « Les Dames de Saint-Nicolas » Courtrai kaj
Dixmude. Oni petu prospekton al la Respektinda Superulino.

Strumpaĵoj : ESPERANTISTOJ, aĉetu ĉiam ĉe la bonkonata firmo Soj. MATHIEUX
kaj Filoj : 49, Marché aux Poulets, BRUSELO. Delegito por Belgujo de U. E. A.

Sinjoro VERHAUT, Presisto en Courtrai.